# *La problemoj de Venezuelo kaj la laborista rolo*



Karakaso, 15 nov (RHK) La prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro asertis ke la problemoj de la lando nur solveblas pere de la laboristoj, tial ke sen la laborista klaso ne estas socialismo, kaj sen la socialismo ne estas sendependeco, nek patrolando, nek evoluo.

Dum renkonti?o kun la produktivaj konsilantaroj de laboristoj en la industria centro Tiuna, en Karakaso, la prezidento Maduro instigis garantiadi al la laboristaro ?iujn necesajn rimedojn por stimuli la landan produktadon, raportis la televida ?eno Telesur.

Li petis ke la proponoj de la laboristoj estu konsiderataj de la nacia konstitucia asembleo, “?is  transformi tiun tutan forton en konstitucian le?on de la produktivaj konsilantaroj de laboristoj”, ?ar tiel “la ekonomia evoluo estos  reala, vera, gvidata de tiuj kiuj prenos sur sin la gvidadon de nia nuntempo kaj estonteco.”

Li parolis pri la nova sistemo pri sano, kun altnivela teknologio je la servo de la tuta popolo; cetere, li anoncis la kreadon de speciala plano por stimuli la produktadon de sukero per socialistaj entreprenoj, i.a.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/147457-la-problemoj-de-venezuelo-kaj-la-laborista-rolo

Radio Habana Cuba